

Saluton !

He aquí un nuevo número del Boletín Electrónico de la [Federación Española de Esperanto](#).



Jen nova numero de la Bitbulteno de [Hispana Esperanto-Federacio](#).

## CELEBRAMOS EL DÍA INTERNACIONAL DEL ESPERANTO

El 15 de diciembre la comunidad de hablantes del esperanto celebrará como todos los años el Día Internacional del Libro en Esperanto, también llamado *Zamenhof-Tago*. La mayor parte de los grupos y asociaciones de hablantes del idioma organizarán actividades culturales, sociales o festivas para celebrar el día y disfrutar de la cultura producida en esperanto.

También en España se van a desarrollar actividades en las principales ciudades, la mayor parte de ellas ya este fin de semana. Algunas de ellas pueden consultarse en [este enlace](#) (en esperanto). Así por ejemplo, en Madrid habrá actividades culturales diversas el domingo 14, entre ellas la presentación de una antología de relatos originalmente escritos en esperanto, traducidos al sueco. En Barcelona el día 15 se presentará un refranero bilingüe esperanto-catalán, y el día 13 se celebrará una jornada de Puertas Abiertas en el Museo de Esperanto de Subirats. En Sevilla los esperantistas andaluces conmemorarán el centenario de "Platero y yo" cuya [traducción al esperanto](#) editó la Asociación Andaluza de Esperanto. Otros encuentros tendrán lugar en Bilbao, Valencia, Santander, Teruel, Zaragoza, Murcia, Vigo o Salamanca, por citar sólo algunos de los más destacados.

Animamos a hablantes y

## NI CELEBRAS INTERNACIAN ESPERANTO-TAGON

Kiel ĉiujn jarojn, la esperantistoj de la tuta mondo celebros ankaŭ ĉijare la Internacian Tagon de Esperanto aŭ Zamenhof-Tagon. Plejmulto de la kluboj kaj asocioj esperantistaj organizos aranĝojn kulturajn, sociajn aŭ festajn por celenri la tagon kaj ĝui la kulturon produktitan en tiu lingvo.

Ankaŭ en Hispanio disvolviĝos aktivadoj en ĉefaj urboj, plejparte jam dum tiu i scemajnfino. Kun kelkaj el ili eblas konatiĝi [en tiu ĉi ligilo](#). Ekzemple, en Madrido organiziĝis diversaj kulturaj aktivadoj la dimanĉon, 14-an, inter kiuj prezentado de antologia de rakontoj tradukitaj el Esperanto en la svedan. En Barcelono la 15-an oni prezentos dulingvan proverbaron esperantan-katalunan, kaj la 13-an organiziĝis malferman viziton al la Esperanto-muzeo de Subirats. En Sevilo la andaluzaj esperantistoj kunmemoros la centan datrevenon de la publikigo de la libro "Platero kaj mi" de la Nobelpremiito Juan Ramón Jiménez, kies [tradukon al Esperanto](#) eldonis Andaluza Esperanto-Unuiĝo. Aliaj kunvenoj okazos en Bilbao, Valencio, Santandero, Teruelo, Zaragoza, Murcio, Vigo aŭ Salamanko, nur por citi kelkajn el la plej elstaraj.

Ni invitas parolantojn kaj simpatiantojn partopreni se eble, kaj disvastigi la kunmemoron inter la homoj interesiĝantaj pri Esperanto. Oni povas kontakti [la organizantajn grupojn](#) aŭ la Federacion por koni pliajn detalojn.

simpatizantes a participar en las que le sea posible y a difundirlas entre las personas interesadas. Puedes contactar con cada [grupo organizador](#) o con la Federación para conocer los detalles.

## 60 AÑOS DE UNESKO Y ESPERANTO

El movimiento por el esperanto celebró el día 10 de diciembre el 60 aniversario de su primer reconocimiento oficial en el marco del sistema de las Naciones Unidas. En concreto, el 10 de diciembre de 1954, la Conferencia General de la UNESCO, reunida en la capital uruguaya Montevideo, por medio de una resolución oficial, tomó nota de "los resultados alcanzados gracias al Esperanto en el ámbito de los intercambios intelectuales internacionales y en pro del acercamiento de los pueblos del mundo", y reconoció que estos resultados corresponden a los objetivos e ideales de la Unesco.

Con ocasión de este 60 aniversario, el Dr. Mark Fettes, presidente de la [Asociación Universal de Esperanto](#), ha escrito una concisa declaración, resumiendo la importancia de la cooperación entre el movimiento por el esperanto y la UNESCO, que la Federación ha traducido al castellano, y que puede leerse [en este enlace](#).

A lo largo de los próximos meses, bajo el nombre "Montevideo 60", la Asociación Universal de Esperanto, y sus organizaciones colaboradoras, entre las cuales la Federación Española de Esperanto, tienen previsto desarrollar una serie de actuaciones conmemorativas de ese hito, y de difusión de los objetivos comunes de la UNESCO y de la comunidad esperantista.

Las dos resoluciones de la UNESCO pueden leerse de forma íntegra [en este enlace](#).

## 60 JAROJ DA UNESKO KAJ ESPERANTO

La 10-an de decembro la Esperanto-movado festis la 60-an datrevenon de ĝia unua oficiala agnosko kadre de la sistemo de Unuiĝintaj Nacioj. Konkrete, la 10-an de decembro 1954 la Ĝenerala Konferenco de Unesko per oficiala rezolucio notis la kontribuojn de Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo, kaj agnoskis, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko.

Okaze de la 60-jariĝo de la unua Unesko-rezolucio, la prezidanto de [UEA](#), d-ro Mark Fettes, verkis koncizan deklaron, kiu resumas la signifon de la kunlaboro inter la Esperanto-movado kaj Unesko. *Esperanto estas ne nur teknika rimedo de komunikado, li atentigas, sed kultura kaj eduka projekto, celanta daŭripovan kaj justan mondan socion. Ĉar la procezo de tutmondiĝo minacas la homan diversecon, egalecon kaj justecon, hodiaŭ la streboj de Unesko kaj de la esperantistoj estas same aktualaj kaj urĝaj, kiel antaŭ 60 jaroj. Ĝi estas legebla komplete en [tiu ĉi ligilo](#) kaj HEF tradukis ĝin en la hispanan lingvon [en nia retejo](#).*

Dum la venontaj monatoj UEA lanĉos kampanjon "Montevideo 60" por festi la datrevenon kaj reliefigi la multajn ligojn inter la agadoj de la Esperanto-movado kaj la laboro de Unesko. Hispana Esperanto-Federacio aliĝos al la kampanjo kaj provos ĝin efektiviĝi en Hispanio.

Tekstoj de la [rezolucioj de Unesko](#) pri Esperanto.



## TRES AUTORES ESPAÑOLES EN ANTOLOGÍA TRADUCIDA AL SUECO

Tres autores españoles han sido elegidos entre los 29 cuyos relatos y novelas cortas, procedentes de diferentes países del mundo, han sido traducidos al sueco en una antología editada esta pasada semana. La peculiaridad es que se trata en todos los casos de relatos escritos originalmente en la lengua internacional esperanto.

La antología, cuyo título es "Söka bostad i storstaden" (*Buscar alojamiento en la gran ciudad*) ha sido traducida por Leif Nordenstorm y Sten Johansson, y contiene treinta relatos de diferentes épocas, estilos, temas y países, unidos sólo por el idioma común de origen, el esperanto. Algunos de los autores son ya clásicos en la literatura en esta lengua, mientras que otros son escritores que continúan produciendo sus obras en la actualidad.

Los tres autores españoles son Miguel Gutiérrez Adúriz (que escribe sus obras bajo el pseudónimo *Liven Dek*), Jorge Camacho y Miguel Fernández Martín. Los tres suelen ser agrupados, junto con otros autores procedentes de la Península Ibérica, en lo que se ha dado en llamar la "[Escuela Ibérica](#)", uno de los grupos mejor considerados internacionalmente de la literatura actual en esperanto.

La literatura en esperanto es muy desconocida fuera de los ámbitos de hablantes de este idioma internacional, pero cuenta con una tradición de más de 120 años, y ha alcanzado un grado de madurez notable. Aunque es más habitual su uso como lengua puente, y para dar a conocer las literaturas nacionales a un público internacional, no obstante algunas obras originales han sido a su vez traducidas a otras lenguas.

La edición se ha producido poco antes de la celebración del Día Internacional del Esperanto, ya mencionado, y que originalmente estaba dedicado a promocionar los libros publicados en este idioma. Está previsto aprovechar la edición del nuevo libro para presentarlo al menos en las ciudades de Madrid y Santander, lugar donde residen algunos de los autores mencionados

## TRI HISPANAJ VERKISTOJ EN INTERNACIA ANTOLOGIO TRADUKITA EN LA SVEDAN

Tri hispanaj verkistoj troviĝas inter la 29 selektitaj por ĵus eldonita antologio de rakontoj tradukitaj en la svedan lingvon. La speciala cirkonstanco estas ke la rakontoj estis originale verkitaj en Esperanto.

La antologio titoliĝas "Söka bostad i storstaden" (*Serĉi loĝejon en la granda urbo*) kaj estis kompilita kaj tradukita de Leif Nordenstorm kaj Sten Johansson. Ĝi enhavas rakontojn el diversaj epokoj, stiloj, temoj kaj landoj, nur unuigitaj per la origina lingvo.

La hispanaj aŭtoroj estas Miguel Gutiérrez Adúriz (plumnome *Liven Dek*), Jorge Camacho kaj Miguel Fernández. Ili estas kutime grupigitaj, kune kun aliaj verkistoj devenantaj el la iberia duoninsulo, en la tiel nomata *Ibera Skolo* de literaturo.

La libro estos prezentita en Hispanio dum la celebradoj de la Tago de la Libro en Esperanto, en Madrido kaj Santandero.



## ESPERANTO EN HERRERA DEL DUQUE

Acaba de comenzar en la localidad de Herrera del Duque (Badajoz) un curso de iniciación al esperanto. Tras una exitosa charla-taller de presentación en noviembre, el curso ha arrancado con una veintena de alumnos.

Puede leerse [un reportaje en el periódico local](#), con una entrevista a Javier Romero Tello, responsable de las clases, explicando la naturaleza del esperanto, y mostrando su esperanza de poder celebrar el Congreso Español de Esperanto en Herrera del Duque en el año 2016.

## ESPERANTO EN HERRERA DEL DUQUE

Ĵus komenciĝis en la urbeto Herrera del Duque (provinco Badajoz) enkonduka kurso de Esperanto. Post sukcesa presenta prelego plus ateliero, la kurso komenciĝis kun dudeko da lernantoj.

Oni povas legi [raporton en la loka ĵurnalo](#) kun intervjuo al Javier Romero Tello, respondeculo de la klasoj, eksplikante la naturon de Esperanto kaj montrante sian esperon povi okazigi la Hispanan Kongreson de Esperanto en Herrera del Duque en la jaro 2016.

**TALLER DE**  
**ESPERANTO**  
IDIOMA FÁCIL Y FASCINANTE

¡Haz amigos en todo el mundo!



**INICIO:** Martes 25 de noviembre.  
**HORA:** 20.00 horas.

**INFORMACIÓN E INSCRIPCIONES:**  
UNIVERSIDAD POPULAR HERRERA DEL DUQUE  
924 64 22 14 ó [upherreradelduque.es](mailto:upherreradelduque.es)

 

## ARTÍCULO SOBRE FRANCISCO AZORÍN

Un excelente artículo sobre Francisco Azorín Izquierdo se publicó el 30 de noviembre [en Diario de Teruel](#). Arquitecto, político, esperantista, el reportaje descubre su faceta de escritor en español.

Nacido en Teruel, aunque la mayor parte de su vida profesional la pasó en Córdoba, tuvo que exiliarse en México al final de la contienda. Francisco Azorín fue muy activo en el movimiento socialista esperantista antes de la guerra civil. Continuó su actividad a favor del esperanto y de la cultura en su tierra de acogida, donde falleció en 1975.

## ARTIKOLO PRI FRANCISCO AZORÍN

Ege interesa [artikolo pri Francisco Azorín Izquierdo](#) estis publikigita de la ĵurnalo Diario de Teruel la pasintan 30-an de novembro. Arĥitekto, politikisto, esperantisto, la raporto malkovras ankaŭ lian laboron kiel verkisto.

Naskiĝinta en la provinco de Teruelo, li pasigis sian profesian vivon en Kordovo, kaj devis ekziliĝi al Meksiko post la hispana interna milito. Francisco Azorín estis tre aktiva en la socialista esperantista movado antaŭ la milito, kaj poste daŭrigis sian kulturan kaj esperantistan aktivadon en Meksikio, kie li forpasis en 1975.



### **PÁGINA DEL CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO EN CULLERA**

El próximo Congreso Español de Esperanto, que tendrá lugar en la turística localidad valenciana de Cullera, a comienzos de mayo de 2015, dispone ya de una página web <http://esperantoval.org/cullera2015/>, donde pueden consultarse ya las informaciones básicas sobre este acontecimiento y la forma de apuntarse.

### **RETEJO DE LA HISPANA ESPERANTO-KONGRESO EN CULLERA**

La venonta Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazos komence de majo 2015 en la valencia turisma urbo Cullera disponas jam je retejo <http://esperantoval.org/cullera2015/>, kie troviĝas la bazaj informoj pri la evento, kaj la maniero aliĝi al ĝi. La retejo estas nun en la hispana, sed post kelkaj tagoj troviĝos tie ankaŭ la esperantaj kaj valenciaj versioj.

### **APÚNTATE A LA FEDERACIÓN**

Ahora que va a comenzar un nuevo año, te sugerimos un buen propósito: si todavía no eres miembro de la Federación Española de Esperanto, ¿por qué no te unes a nosotros? Contribuirás a sostener las actividades que HEF, con sus modestos medios, realiza para promocionar la lengua esperanto y su cultura. Formarás parte de una comunidad de personas comprometidas, que creen que el esperanto es no sólo una lengua, sino también una idea que merece la pena difundir. Incluso disfrutarás de algunas (pocas) [ventajas de carácter práctico](#).

Echa un vistazo a [nuestro boletín de adhesión](#) en la red, o contáctanos en [admin@esperanto.es](mailto:admin@esperanto.es) y estaremos encantados de que te unas a nuestras filas.

### **ALIĜU AL LA FEDERACIO**

Nun kiam baldaŭ komenciĝos nova jaro, ni sugestas novan bonan celon: se vi ankoraŭ ne membras en Hispana Esperanto-Federacio, kial vi ne akompanas nin? Vi kontribuos al la subteno de la aktivaĵoj kiujn HEF, per siaj modestaj rimedoj, realigas por disvastigi Esperanton kaj ĝian kulturon. Vi fariĝos parto de komunumo de homoj kiuj kredas ke Esperanto estas nur lingvo sed ankaŭ ideo disvastiginda. Vi eĉ ĝuos iujn (ne multajn) [praktikajn avantaĝojn](#).

Ĵetu rigardon al [nia aliĝbulteno](#) en nia retejo, aŭ kontaktu nin ĉe [admin@esperanto.es](mailto:admin@esperanto.es) kaj ni tre ĝojos se vi decidus kunmarŝi kun ni.